

LECIONO 12

Gramatiko



– **em** – суффикс, обозначающий «склонный к определенному действию»: *timi* (бояться) – *timema* (боязливый), *fidi* (доверять) – *fidema* (доверчивый), *danki* (благодарить) – *dankema* (благодарный);

– **at** – суффикс, обозначающий причастия, деепричастия и существительные причастного происхождения страдательного залога настоящего

времени: *estimata kolego* – уважаемый коллега, *sciate* – известно, *nekonato* – незнакомец;

– **it** – суффикс, обозначающий причастия, деепричастия и существительные причастного происхождения страдательного залога прошедшего времени: *ricevita letero* – полученное письмо; *farite hieraŭ* – сделано вчера; *arestitoj* – арестованные;

– **ot** – суффикс, обозначающий причастия, деепричастия и существительные причастного происхождения страдательного залога будущего времени: *lernota lingvo* – язык, который будет выучен; *tio estos malpermesote* – это будет запрещено; *persono, kiun oni devas juĝi, estas juĝoto* – человек, которого должны судить, будет обвиняемым;

– **u** – окончание глаголов повелительного наклонения, которое применяется во всех лицах единственного и множественного числа; все эти формы, кроме 2 лица, переводятся при помощи частиц «пусть», «да» и глагольного окончания «те»: *Pli promenu, kie ili volas!* Пусть они гуляют, где хотят! *Ni iru hejmen!* Идёмте домой! *Vivu la demokratio!* Да здравствует демократия! *Prenu libron!* Возьми(те) книгу! *Laboru!* Работай(те)!

Taskoj



I. Tralegu la tekston «Eksterlanda doktoro» kaj atentu signifon de sekvaj vortoj: *bukedo, ĉefo, doktoro, ekzotika, foti, gasto, ideo, kolekti, minuto, ordinara, profesoro, protesti, publiko, rimeno, taksio, zoologia.*

Eksterlanda doktoro

– Onklo Boĉjo, bonvolu lavi kaj kombi Miĉjon, – diris matene Maksim. – Je la dekdua venos Lena kaj Marko. Ili helpos al vi. Sed je la dua post tagmezo ni akceptos profesoron el iu ekzotika lando. Li estas doktoro pri zoologiaj sciencoj. Informita pri la mamutido, li petis permeson veni. Mi konsentis akcepti lin. Do, mi esperas je vi!

– Estu trankvila, ĉefo! – raŭkis Boĉjo. – Ĉion mi ordigos.

La geknaboj, venintaj precize je la dekdua kun Klajd, helpis al oĉjo Boĉjo prepari ĉion por la gasto. Eĉ bukedon da floroj kolektis Lena. Je dek minutoj post la dua al la parko proksimiĝis taksio. Venis la atendata gasto. Li havis orientan veston, longan nazon, nigran barbeton kaj malhelajn okulvitrojn.

– Saluton, sinjoro profesoro! – prononcis li, montrinte orajn dentojn. – Saluton, nepetoj, – dolĉe diris li al la infanoj.

– Saluton kaj bonvenon! – respondis Maksim.

– Bonan tagon, sinjoro! – respondis Lena kaj Marko.

– R-r-r! – suspekteme respondis Klajd, kaj la doktoro



florbukedo

paliĝis.

– Ne timu, ĝi estas sufiĉe pacema hundo, – diris Lena streĉante la rimenon.

Proksimiĝis Miĉjo kaj etendis al la doktoro florbukedon en la rostro.

– Ho, kia miraklo! Kia afabla animalo! – prononcis ravite la doktoro. – Mi legis plurajn artikolojn pri ĝi, pri via sukceso, sinjoro Marsim. Sed, ĉu vi volas por ĉiam lasi ... Miĉjon en ĉi tiu parko ... sen vasta publiko?

– Miĉjo servas por scienco, – respondis Maksim. – Sed kion vi preferus?

– Ho, vi devas prezenti la mamuton al la mondo. Eventuale mi havas kelkajn pretajn ideojn. Unue, la mamuton vi povas vendi ... kontraŭ tre bona pago ...

– Ne, tio ne taŭgas, – diris Maksim.

– Do, la mamuto povas vojaĝi tra la mondo. Ja ĝi ne estas ordinara besto. Vi povas montri ĝin kontraŭ pago. Tio estas bona komerco.

– Ne, Miĉjo dume ne estas forta por vojaĝoj ... ĉefe al sudaj landoj. Ĝi estas norda animalo...

– Bonvolu trinki teon! – aperis oĉjo Boĉjo. Li alportis glasojn, sukeron, kuketojn. Ekvidinte la doktoron, li preskaŭ faligis ĉion.

– Dankon, onklo Boĉjo, – ridetis Maksim. – metu ĉion sur la tablon. Komence ni invitas estimatan gaston fotiĝi kun Miĉjo.

Marko preparis fotilon, sed la gasto ekprotestis:

– Ne, ne! Mi ... ne ŝatas fotojn. Ni trinku teon, – li levis la kapon kaj rigardis supren. Tie, sur arbo, sidis la kato Graf. Ĝi kvazaŭ palpebrumis al la doktoro.



fotilo

II. Trovu en la teksto vortojn de Maksim kaj de la doktoro, kiuj priskribas la mamuton kaj ĝiajn kapablojn.

III. Resumu, kiel prepariĝis niaj herooj al alveno de eksterlanda gasto?



IV. Respondu al la demandoj.

Kion devas fari oĉjo Boĉjo matene? El kiu lando estas profesoro? Kiu helpis al oĉjo Boĉjo? Kian aspekton havis la atendata gasto? Kiel estis akceptita la gasto? Pri kio raviĝis la doktoro? Kiujn proponojn li faris al Maksim? Kiel agis oĉjo Boĉjo ekvidinte la doktoron? Al kio invitis Maksim la gaston? Kion preferis la gasto?

V. Dividu la tekston je partoj kaj titoligu ĉiun. Rerakontu unu el ili.



VI. Tralegu kun helpo de vortaro la rakonton «Gastoj el foraj landoj» kaj diru, kie troviĝas landoj, kiujn reprezentas ĝiaj herooj.

Gastoj el foraj landoj

Dum la lastaj jaroj en Rusion venas multaj eksterlandaj gastoj. Ili alvenas ankaŭ en nian urbon kaj nian E-klubon: homoj de diversaj landoj, aĝoj kaj profesioj. Unua estis altstatura franco el Avignon (Avinjon), eksinstruisto pri matematiko. Li akceptis plezure la inviton al unu el urbaj lernejoj, kie li ĉeestis la feston de la lasta lernotago. El la vizitindaĵoj aparte ĉarmis nian gaston baniĝo en rusa banejo, situanta en la korto de privata ligna domo de nia samklubano en ĉirkaŭaĵoj de la urbo. La geedzoj el Bordeaux (Bordo) kun granda intereso esploris la funkciadon de limonada uzino kaj de mebla kombinumo. Impresis la paron la vizito al tipa rusa vilaĝo, kie oni neniam antaŭe renkontis eksterlandanojn, kaj la unuaj el ili estis akceptitaj larĝanime, bonkore kaj gastamece. Iun vintron vizitis nian urbon juna nederlandano, kiu ŝategis rusajn frostojn kaj eĉ kuraĝis partopreni la regionskalan glitkonkuron. Belsone parolanta kaj ŝatanta kanti sperta itala esperantisto rakontadis pri siaj travivaĵoj kaj sia ĉarma lando. Eleganta angla sinjoro el Birmingham (Birmingem), profesia aktoro, kiun konis kelkaj el ni, estis netipa brito kaj multe ŝercis. Finna maresploristo ŝatas sanan vivmanieron kaj estas vegetarano. Li aktive partoprenis la prezentiĝon de nia E-klubo en unu el urbaj lernejoj okaze de la Tago de Lingvoj. Dum la Tria Lingva Festivalo ĉina kuracisto prezentis al ĝiaj partoprenantoj siam gepatran lingvon. Li mirigis nin per sia volo ellerni la rusan lingvon.



rusa
samovaro

Volonte ni vizitigas al niaj gastoj nian urbon, ĝiajn muzeojn, ekspoziciojn kaj, tutcerte, la fame konatajn antikvajn urbojn de la regiono: Suzdal, Paleĥ, Kostroma, Pljos. Ĉe Volga ili admiras larĝecon de la rivero kaj ne preterlasas eblecon navigi per ŝipeto.

Promenoj tra betula bosko ravas niajn gastojn. Aparte neforgeseblaj por ili estas la renkontiĝoj en amika E-rondo kun niaj klubanoj ĉe rusa samovaro. Aroma teo kaj bongusta kuko vigligas la interparolon. Iom post iom eksonas la gitaro. Kaj la komuna E-kantado kronas la forirantan vesperon. Ĝis revido, karaj geamikoj!

1. Provu transdoni la enhavon de la rakonto laŭ jenaj helpvortoj:

lastaj jaroj – Rusio – urbo – E-klubo – gastoj;

vizitoj – urboj – rivero – ŝipo;

franco – instruisto – lernejo – rusa banejo;

geedzoj – mebla kombinumo – limonada uzino – rusa vilaĝo;

nederlandano – vintro – rusaj frostoj – glitkonkuro;

italo – sperta – varma lando – travivaĵoj;

anglo – eleganta – ŝercema – netipa;
finlandano – maresploristo – vegetarano – Tago de Lingvoj;
E-rondo – ĉe samovaro – interparolo – kantado.

2. *Preparu la skriban rakonton respondante al la demandoj.*

Ĉu vi ŝatus inviti eksterlandajn gastojn al via urbo? Kion vi vizitigus al ili? Pri kio vi dezirus demandi viajn gastojn?

VII. Jen kelkaj landoj kaj ĉefurboj. Ligu ĉiun landon al ĝia ĉefurbo.

lando	urbo	lando	urbo
Irano	Lisbono	Japanio	Brazilio
Ĉinio	Kanbero	Portugaliao	Pekino
Brazilo	Havano	Usono	Tokio
Svedio	Bonaero	Aŭstralio	Vilno
Litovio	Vaŝingtono	Argentino	Taŝkento
Kubo	Dakaro	Senegaliao	Teherano
Uzbekio	Jerusalemo	Izraelo	Stokholmo

VIII. Plenumu la sekvajn ekzercojn.

1. *Transformu la verbojn al pasiva participo atentante la tempoformojn:*

Modelo: trinkis akvon – trinkita akvo.

Legas libron – ... , skribos leteron – ... , riparos seĝojn – ... , atendis gastojn – ... , pendigos bildon – ... , malfermitaj fenestroj – ... , amas junulinon –

2. *Uzu la ĝustajn pasivajn participajn sufiksojn –it–, –at–, –ot–.*

Li ricevis neatend...an leteron. Matene komenc...a laboro devas esti fin...a morgaŭ. La surglu...a poŝtmarko kostas 2 eŭrojn. La vend...a ĉokolado estas produkt...a en Svisio. Ne plaĉis al aŭtoro lia verk...a poemo. En lumig...a ĉambro regis malordo. La lern...a lingvo bezonas praktikon. La vizit...a urbo allogas nin. La filatelistoj kolektas nur la nedifekt...ajn poŝtmarkojn. Kuirarto estas mia dezir...a temo. Ĉiu prezent...a filmo estis plaĉa al publiko.

VIII. Plenumu la sekvajn ekzercojn.

1. *Transformu la verbojn al pasiva participo atentante la tempoformojn:*

Modelo: trinkis akvon – trinkita akvo.

Legas libron – ... , skribos leteron – ... , riparos seĝojn – ... , atendis gastojn – ... , pendigos bildon – ... , malfermitaj fenestroj – ... , amas junulinon –

2. *Uzu la ĝustajn pasivajn participajn sufiksojn –it–, –at–, –ot–.*

Li ricevis neatend...an leteron. Matene komenc...a laboro devas esti fin...a morgaŭ. La surglu...a poŝtmarko kostas 2 eŭrojn. La vend...a ĉokolado estas produkt...a en

Svisio. Ne plaĉis al aŭtoro lia verk...a poemo. En lumig...a ĉambro regis malordo. La lern...a lingvo bezonas praktikon. La vizit...a urbo allogas nin. La filatelistoj kolektas nur la nedifekt...ajn poŝtmarkojn. Kuirarto estas mia dezir...a temo. Ĉiu prezent...a filmo estis plaĉa al publiko.

IX. Traduku en Esperanton uzante la volutivan finaĵon –u.

Закройте дверь! Съешь хотя бы кусочек сыра! Идите к кассе! Не читайте плохих газет и не говорите плохих слов! Будьте внимательны при переходе улицы! Изучайте Эсперанто! Живите долго и счастливо!

X. Enskribu la sekvajn verbojn en taŭgaj formoj: akcepti, etendi, esperi, flori, foti, preferi, prepari, protesti, suspekti, taŭgi, timi, vojaĝi.

Homoj devas ... kontraŭ maljusteco. Parencoj ... je resaniĝo de la etulo. Lernantino ... siajn hejmtaskojn diligente. Policano ... la arestitan viron je ŝtelo. Ni ŝatas ... pertrajne kaj ... vidindaĵojn de urboj. Tiu ĉi ĉemizo ne ... al vi: ĝi estas tro granda. Ne ... la dresitan hundon! Mi ... abrikotojn al ĉerizoj. Printempe ... multaj arboj kaj arbustoj. Antaŭ alveno de gastoj la mastrino ... la diverskoloran tablotukon sur tablon. Ni ... morgaŭ gastojn en la klubo. Necesas ĉiam ... je homoj.

XI. Traduku la esprimojn kaj kompilu frazojn kun kelkaj el ili:

принимать гостей, принять российское гражданство, принять на работу, принять решение, принять закон, принять меры, принять участие, принять к сведению, принять лекарство, принять (за кого-либо).

XII. Tralegu kaj ellernu la proverbojn. Trovu ekvivalenton de ĉiu proverbo en via nacia lingvo.

Dirite, farite.

Vojon batitan herbo ne kovras.

Malbone akirita, baldaŭ perdita.

Edzin' admirata – edzo malsata.

Kredite aĉetita porko gruntas la tutan jaron.

XIII. Ni kantu «Vivu la stel'» de Agnes B. Deans.

1. Voĉlegu la tekston de la kanto kaj traduku ĝin.

2. Klarigu ĉiun markitan gramatikaĵon.



Vivu la stel'

Gaje

1. Ple - ni - gu la gla - son ho ĉi - u bo - nul', vi - vu la ver - da
stel! Kaj kan - tu la ho - moj el ĉi - u an - gul' -
Refreno
vi - vu la ver - da stel! Ho, vi - vu la, vi - vu la,
vi - vu la stel', vi - vu la, vi - vu la, vi - vu la stel',
vi - vu la stel', vi - vu la stel', vi - vu la ver - da stel!

Plenigu la glason, ho, ĉiu bonul',
Vivu la verda stel',
Kaj kantu la kanton **en ĉiu** angul',
Vivu la verda stel'.

Refreno: Ho, vivu la, vivu la, vivu la stel',
Vivu la, vivu la, vivu la stel',
Vivu la stel', vivu la stel',
Vivu la verda stel'.

Plenigu la glason kaj tostu **kun** ni,
Vivu la verda stel',
La lingvon kreitan **por** ĉiu naci',
Vivu la verda stel'.

Refreno: Ho, vivu ...

Per voĉoj **de** nia kunbatalantar',
Vivu la verda stel'.
Resonu la voĉoj **sur** tero kaj mar',
Vivu la verda stel'.

Refreno: Ho, vivu ...

Ŝlosiloj al la taskoj

Tasko VIII

2) Li ricevis neatenditan leteron. Matene komencita laboro devas esti finota morgaŭ. La surgluita poŝtmarko kostas 2 eŭrojn. La vendata ĉokolado estas produktata en Svisio. Ne plaĉis al aŭtoro lia verkita poemo. En lumigita ĉambro regis malordo. La lernata lingvo bezonas praktikon. La vizitota urbo allogas nin. La filatelistoj kolektas nur la nedifektitajn poŝtmarkojn. Kuirarto estas mia dezirata temo. Ĉiu prezentita filmo estis plaĉa al publiko.

Tasko IX

Fermu pordon! Formanĝu almenaŭ peceton da fromaĝo! Iru al kasejo! Ne legu malbonajn ĵurnalojn kaj ne diru (ne elparolu) malbonajn vortojn! Estu atentemaj je trapaso de strato! Lerne Esperanton! Vivu longe kaj feliĉe!

Tasko X

Homoj devas protesti kontraŭ maljusteco. Parencoj esperas je resaniĝo de la etulo. Lernantino preparas siajn hejmtaskojn diligente. Policano suspektas la arestitan viron je ŝtelo. Ni ŝatas vojaĝi pertrajne kaj foti vidindaĝojn de urboj. Tiu ĉi ĉemizo ne taŭgas al vi: ĝi estas tro granda. Ne timu la dresitan hundon! Mi preferas abrikotojn al ĉerizoj. Printempe floras multaj arboj kaj arbustoj. Antaŭ alveno de gastoj la mastrino etendis la diverskoloran tablotukon sur tablon. Ni akceptos morgaŭ gastojn en la klubo.

Tasko XI

принимать гостей – akcepti gastojn, принять российское гражданство – iĝi rusia civitano, принять на работу – dungi al laboro, принять решение – decidi, принять закон – akcepti leĝon, принять меры – uzi rimedojn, принять участие – partopreni, принять к сведению – konsideri, принять лекарство – preni (engluti) kuracilon, принять за кого-либо – opinii (iun iu)